

BULGARA

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

3

BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝlev,
Stefan Maserov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por fremdlando — 16 levoj aŭ
1,5 dolaroj jare.

Tarifo por reklamoj: 5 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adresoj
estas presataj senpage.

KONKURSO

Okaze de la ZAMENHOFA-
jaro la redakcio de «Bulgara
esperantisto» organizas kon-
kurson por plej bonaj belartaj
verkoj (versajoj, rakontoj, ski-
zoj, pentraĵoj k. a.) pri la aŭ-
toro de Esperanto kaj ĝia verko.
La verkoj povas esti skribitaj en
Esperanto aŭ en bulgara ling-
vo.

Templimo de la konkurso —
la fino de novembro 1959.

ENHAVO

Por amasa kaj forta asocio	1
Organiza vivo	2
La protokoloj — gravaj dokumentoj Iv. Sarafov, V. Oljanov	6
Esperantistoj, pereintaj por la libero- Angel Ivanov-Angelo	8
8-a de Marto — Internacia virina ta- go Tr. Petkova	9
Literaturaj paĝoj: Petro Poliŝĉuk — versajoj	11
Bogdan Ovesjanin — Levski parolas	12
Mihail Stojanov — Feliĉo (rakonto)	12
Lingva konsilejo: «kaj», «ankaŭ», «same»	16
Letero el Vietnamio	

LA REDAKCIO akceptas materia-
lojn por la koncerna numero de «Bul-
gara esperantisto» ĝis la 12-a de la
antaŭa monato. Nur kiel escepto gra-
vaj aktualaj materialoj estos akcep-
tataj ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skribi tre
klare, kun granda interlinia spaco
kaj marĝeno. Manuskriptoj ne estas
resendataj.

Varbu novajn abonantojn



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

POR AMASA KAJ FORTA ASOCIO

Grandega, respondeca estas la plenumo de la tasko, starigita de la dua plenkunsido de CK de Bulgara Esperanto-asocio la 4-an de januaro ĉi-jare — la societoj lokaj de 85, kiom ili estis dum la pasinta jaro, plikresku je 150 en la fino de la kuranta Zamenhofa jaro, kaj la societaj membroj dum la sama periodo de proksimume 3000 atingu la ciferon 4500. Tio efektive donos al nia asocio rajton esti konsiderata amasa kulturkleriga organizo.

Ĉu la tasko estas plenumbla? Jes. Eĉ ni povos atingi pliajn sukcesojn.

Kiuj estas la kondiĉoj por tio? Je unua loko ni montru la grandan favoron al Esperanto-movado fare de la partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatuloj. Je dua loko — la granda politika, kultura kaj kleriga vigleco de la plej vastaj popoltavoloj. Ni estas lando, kie ne ekzistas analfabetoj. Ne estas familio, kie oni ne abonis almenaŭ unu journalon aŭ revuon. La librojn ĉe ni oni disvendas grandkvante. Milionoj da homoj membras al la socipolitika organizajo Oteĉestven front, al popolaj legejoj, multajn centojn nombras la partoprenantoj en diversaj amatoraj trupoj kaj grupoj. La vivnivelo de la popolo konstante kreskas. Nia kooperativa vilaĝo nun estas nerekonbla kompare kun la proksima pasinteco. Do la plej densaj tavoloj, ne nur la intelektularo, de tiu vigla popolo konsideras Esperanton kaj la Esperanto-movadon kiel altvaloran kulturan faktoron. Je tria loko — la kulturita grundo por Esperanto de la ĝisnunaj penoj de la movado. En multaj loĝlokoj malnovaj esperantistoj ne aliĝis al la lokaj Esperanto-societoj. Je kvara loko ni devas montri la grandan nombron de novaj kursanoj. Nur post nia brila 33-a Esperanto-kongreso en Varna dum julio 1958 jaro funkciis pli ol 150 elementaj Esperanto-kursoj kun ĉ. 3000 gekursanoj. Fine ni devas mencii ankaŭ la fakton, ke pasintjare sen gravaj penoj la asocia membraro plikreskis per preskaŭ 1000 novaj membroj.

La plenumo de la tasko dependas nur de la agmaniero de ĉiu esperanta societo, de ĉiu aparta organizita esperantisto. Jam en la unuaj monatoj de la jaro ni direktu nian atenton al la malnovaj flankestarantaj esperantistoj. Se ni obstinas, ni povos ensocietigi la grandan parton de ili. La ora fonto de nia movado estas la kursoj. Nia slogano devas esti: Ĉiuj sukcese finintaj la kursojn — membroj de la societoj.

En la venonta numero de «Bulgara Esperantisto» ni publikigos tabelon pri la membraro de niaj societoj en la fino de 1958 jaro kaj proponon por plikresko de la societa membraro dum la kuranta Zamenhofa jaro. Sur tiu bazo CK de BEA anoncos konkuradon inter la lokaj Esperanto-societoj. Ekde la unuaj monatoj de la jaro ni streĉu niajn fortojn por amasigo kaj plifortigo de niaj organizaĵoj!

AL STREĈA LABORO POR 65 NOVAJ LOKAJ ESPERANTO-SOCIETOJ DUM LA ZAMENHOFA JARO!

Listo

de novefonditaj societoj

1. Vilaĝo **Radanovo**, distrikto de Tarnovo, (fondita la 12-an de februaro) kun 19 membroj
2. Urbo **Sozopol**. Societo «Apolonia», (fondita la 2-an de februaro) kun 15 membroj.
3. Urbo **Elĥovo** (fondita la 10-an de februaro) kun 13 membroj.
(daŭrigota)

ORGANIZA*ivo*

NOVAJ SOCIETOJ

Radanovo, distrikto de Tarnovo. Ankaŭ en nia vilaĝo jam estas Esperanto-societo. Ĝin ni fondis la 12-an de januaro j. k. Aliĝis 19 gesamideanoj. Por prezidanto ni elektis Todor P. Marinov, sekretariino Ivanka Dimitrova, estrarano — Georgi Kànev. La sukceson ni ŝuldas al k-do Hristo Manolov el la najbara vilaĝo Polski Trambeŝ, membro de CK de BEA, kiu tra frosto kaj neĝo vizitas regule semajne eĉ piede vilaĝon Radanovo kaj gvidas Esperanto-kurson.

T. P. M.

Sozopol. La 2-an de februaro en la ejo de la kooperativo «Narkoop» okazis kunveno por fondo de loka esperanta s-to en nia urbo. Partoprenis malnovaj esperantistoj kaj kursanoj de funkcia Esperanto-kurso. Pri la rolo de la internacia lingvo parolis s-ano Dimitar Vasilev. La kunveno decidis proklami la fondon de loka Esperanto-societo sub la nomo «Apolonia» — la malnova nomo de nia apudmara urbo. Kiel prezidanto estis elektita s-ano Dimitar Vasilev kaj sekretariino Milka Antonova. Al la societo aliĝis 15 gemembroj.

Dim. Vasilev

VIGLA AGADO DE LA ESPERANTISTOJ EN PLOVDIV

La anaro de la Esperanto-societo «Kulturo» en Plovdiv post sia amasa partopreno ĉe la kongreso en Varna (preskaŭ 100 personoj) eklaboris vigle jam en la komenco de la aŭtuno por rikolti la rezultojn de sia dum-somera agado kaj propagando.

Utiligante sian propran klubejon en la centro de la urbo, la societo anoncis kurson por geurbanoj, kiu komenciĝis la 1-an de oktobro kun pli ol 80 partoprenantoj, gvidatan de At. Šopov. Unu post alia estis malfermitaj ankoraŭ kelkaj kursoj en kvartaloj kaj entreprenoj, gvidataj de At. Krumov, Mihail Danĉev kaj aliaj. Speciala kurso por blinduloj estas gvidata de Ivan Bataklijev.

La 15-an de novembro la societo aranĝis en sia klubejo letervesperon, kiu havis tre grandan sukceson kaj estis vizitita ankaŭ de neesperantistoj. Estis legata granda parto de la 66 korespondaĵoj, alvenintaj el ĉiuj partoj de la mondo. Per tiu letervespero preskaŭ ĉiuj gekursanoj akiris por si konvenajn korespondantojn kaj tiamaniere ilia fervoro por ellerni la lingvon estiĝis ne nur konstanta, sed ankaŭ pligrandiĝis. Dank' al la korespondado jam en la komenco de la kursoj la granda plimulto de la gekursanoj restis en la kursoj, kiuj baldaŭ finiĝos, havante neatendite grandan sukceson.

La 30-an de novembro en Plovdiv gastis 9-persona grupo de polaj geartistoj — esperantistoj, kiuj prezentis programon por la geurbano. Dank' al la fakto, ke la alveno de tiu grupo estis sciigita jam du semajnojn antaŭe al la plovdivaj esperantistoj, ili havis eblecon bone sin prepari kaj utiligi ties gastadon por fari propagandon kaj altiri la atenton de la tuta urbanaro al nia espe-

ranta afero. Estis luita la plej moderna kinejo en Plovdiv «Geo Milev» kaj la programo de la polaj esperantistoj estis kelktage vaste reklamata ĉiumaniere: per afiŝoj, per ĵurnalo kaj per la radio. La sukceso estis grandega kaj superis eĉ niajn esperojn — la salono estis plenplena kaj pro manko de sidlokoj multaj vizitantoj staris. La pola esperantista trupo kun granda entuziasmo kaj certeco sub la gvidado de la ano de LKK — Laskowski plenumis la tutan programon kaj estis rekompencata per brua aplaŭdado de la ravita publiko.

Tiu prezentaĵo estis organizita kun celo propagandi la jubilean 44-an universalan kongreson en Varsovio kaj ĝi bone atingis sian celon: la nombro de la dezirantoj viziti la kongreson estas tre granda en Plovdiv. La programo daŭris du horojn kaj estis prezentata en modela esperanta lingvo. S-rino Maria Niemirow, aŭtoro de libro pri la vivo de Zamenhof, legis ĉapitrojn el sia verko kaj ankaŭ havis grandan sukceson.

La vesperon de la sama tago en la klubejo de la societo okazis renkontiĝo de la polaj gastoj kun la plovdiva samideanaro. La klubejo estis plenplena. S-ano Laskowski klarigis multflanke ĉiujn aferojn, koncernantajn la internacian kongreson kaj detale respondis al multaj demandoj de interesuloj.

La sekvintan tagon en la klubejo komenciĝis nova kurso por geurbanoj kun 50 partoprenantoj. Oni povas diri, ke tiu kurso estas plejparte rezulto de la granda propagando, kiun ni faris per la prezentaĵo de niaj polaj samideanoj. Gvidanto de tiu kurso estas nia malnova kaj sperta samideano Ivan Šivarov.

La 15-an de decembro la esperantistoj en Plovdiv solene festis la naskiĝtagon de la Majstro per publika kunveno kun arta programo en la salono de la kulturagantoj. La plovdivanoj vizitis amase la kunvenon kaj la kantantoj kaj deklamantoj estis longe aplaŭdataj. Grandan meriton por la sukceso de tiu solenaĵo havis inĝ. Ŝivarov — filo de nia samideano Ivan Ŝivarov, kiu dum la tuta tempo akompanis la muzikaĵojn per piano.

Nia malnova, sperta kaj tre lerta samideano Penĉo Petrov — vicprezidanto de societo «Kulturo» — instruisto en la speciala lernejo «Vasil Levski» — jam de la komenco de la lernojaro gvidas tre bone sukcesantan kurson en la lernejo, en kiu par-

toprenas gelernantoj de diversaj klasoj. Samtempe k-do Petrov gvidas kurson en la organizaĵo de la Patrolanda fronto en la kvartalo, en kiu li loĝas.

La 3-an de februaro komenciĝis nova centra kurso por geurbanoj en la klubejo. Tiun kurson gvidas At. Ŝopov.

Tre bona propagandilo de la kulturanoj estas la vitrino sur la ĉefstrato, kie estas ekspozitaj diversaj materialoj pri la esperanta movado kaj interesaj esperantaĵoj.

Ĉiumerkrede la gemembroj kunvenas en la klubejo kaj parolas nur Esperanton, ekzercante fervore la lingvon kaj sin pretigante por la kongreso en Varsovio.

At. Ŝopov

Jarkunveno de societo „David Sasonov“

Asenovgrad. La 1-an de februaro la esperantista societo «D. Sasonov» havis sian regulan jarkunvenon. La kunveno pasis je alta nivelo.

En sia raporto la estraro informis, ke dum la pasinta periodo la societo atingis bonajn rezultojn. Tamen ili povis esti pli grandaj, se en la agadmaniero de la estraro kaj anaro mankis iuj difektoj. La estraro ne sukcesis lui oportunan klubejon, regule ne laboris laŭplane, ne sukcesis aktivigi la kolektivan korespondadon, la kulturkleriga agado same ne estis en bona stato kaj aliaj.

La plimulto de la ĉeestantoj partoprenis la diskutojn, kritikis kaj donis bonajn proponojn por plibonigo de la labormetodoj. Parolante kaj kritikante la estraron, ili ankaŭ sin mem kritikis pri iuj faritaj difektoj dum la pasinta jaro. Kiel ĉefan kaŭzon ili citis, ke la estraro ne sukcesis plenumi iujn planitajn taskojn. Ekzemple, kvankam ni havas decidon en niaj kunsidoj, kunvenoj kaj renkon-

tiĝoj paroli nur esperante, tamen ni daŭrigas la uzadon de la nacia lingvo. Iuj emfazis, ke «pli bone estus, se ni parolas erare la lingvon Esperanto, ol neniam paroli ĝin» ĉar nur laŭ la unua maniero ni perfektigos en la lingvo.

Elektante novan estraron, oni liberigis iujn anojn de la pasintjara estraro, kiuj pro okupiteco aŭ aliaj kaŭzoj ne donis sufiĉe bonan laboron, kaj estis elektitaj novaj pli entuziasmoplenaj samideanoj, kiuj dum la pasinteco estas donintaj multon por nia kara Esperanto-movado.

En sia unua kunsido la nove elektita estraro ellaboris tutjaran planon. Ĉiuj estraranoj donis solenan promeson labori senlace por plibonigi la agadon de la societo, por ke ĝi povu dum la kuranta jaro okupi indan lokon inter la Esperanto-societoj en nia lando. Por tio fortojn kaj konojn ni havas, kaj faros ĉion eblan ĝin plenumi.

Atanas Gaev

FORTE BRILAS LA VERDA STELO

Sofio. Dum la regula kunveno de soc. «M. Gorkij» je la 22-a de januaro oni aŭskultis raporton de samideanino Trajana Petkova pri ŝia vizito al la geesperantistoj en Odesa kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj en unu ekskurso de la Patrolanda fronto en USSR. Ŝi sciigis, ke skulptisto Gribov, fervora esperantisto, ornamis la odesan Esperanto-klubejon per la busto de Zamenhof. Li preparas trimetran monumenton de la Majstro okaze de ekspozicio de la pentristoj en Moskvo. S-ino Petkova estis ĝojege akceptita de la esperantistaj rondoj en Odesa.

Jarkunveno de la sofia esp. societo «Maksim Gorki» okazis je la 1-a de februaro. Pri la agado de la societo raportis ĝia prezidanto Kunĉo Valev. La jaro montras gravajn paŝojn antaŭen. Plene ordiĝis la ĉiusemajnaj kunvenoj — entute — 52 kunvenoj. Ĉiu kunveno havis interesan kulturan, propagandan kaj organizan programon. Formiĝis literatura, geinstruista, belarta rondoj kun kreskantaj agadoj. Formiĝis ankaŭ junulara grupo kun pli ol 50 anoj kaj aktiva vivo. Grava estas la amasa partopreno en la nacia kongreso en Varna kun pli ol 120 partoprenantoj, la renkonto de multaj eksterlandaj gastoj dum la jaro — anglaj, polaj, francaj. La societo sukcesis ekinteresi la estraron de la nacia biblioteko «V. Kolarov», kiu aranĝis kurson por siaj oficistoj, la teatron «Trudov Front», kies geartistoj aktive helpas la agadon de la societo. Ĉe la societo estas gvidataj 24 kursoj por komencantoj kun 550 gekursanoj kaj 5 kursoj kun 95 gekursanoj. Multaj libroj el la biblioteko estis disdonitaj kaj tralegitaj. La lingva nivelo de la membroj estas konsiderinde plialtigita.

Por la nova jaro oni elektis 7-membran estraron: Nikola Nikolov — prezidanto, Mihail Petrov — sekretario, Viktor Cenov — kasisto, Stojan Muraresku — fako kursoj, Stojĉo Stojĉev — Kultur-kleriga fako, Stefka Kasabova — bibliotekistino, Lazar Mladenov — dommastro.

Oni konstatis, ke inter pli ol 2000 sofiaj geesperantistoj nur 271 estas organizitaj de la societo. Ĉi-jare ilia nombro devas atingi la ciferon 400, la membroj — subtenantoj — pli ol 30, la lingva nivelo devas esti ankoraŭ plialtigita. Novaj libroj devas eniri en la bibliotekon, najbaraj societoj estas vizitotaj kaj kunhelpotaj. Tiuj decidoj estas bonaj. Sed ni memorigu, ke la societo ofte prenas bonajn decidojn, sed ne plenumas ilin. Ni esperu, ke la nova estraro ekmarŝos novan vojon kaj scipovos plivigligi la societanojn.

Stefan Kadiev

Kubrat. La 24-an de januaro okaze de la tradicia vesperamuzo de esp. societo «Progreso» grupo de 6 geanoj de societo «Libero» — Ruse, gvidata de nia centrakomitato s-no Georgi Bojkov, vizitis la amuzon por esprimi estimon kaj samideanan solidarecon al brave kaj fervore laborantaj progresanoj. Ilin gvidas senlaca kaj sindonaj prezidanto — Kirĉev kaj sekretario — la instruisto Hristo Dimitrov, meritantoj ĉies admiron!

Grave helpas la movadon la loka organizaĵo de BKP en la persono de la sekretario k-do Petr Kolev. Je la fino de bela literatura programo s-no Georgi Bojkov je la nomo de nia CK kaj societo «Libero» — Ruse salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris pluajn sukcesojn per konve-

naj vortoj. Ĉeestis gastoj el Ispcrih, v. Ĉereŝovo, v. Biseri, v. Ŝtraklevo.

Societo «Progreso» havas novan bele ornamitan klubojn, en kiu ĝi aranĝis 3 kursojn.

Boris Kavalĝiev

Kolarovgrad. La 1-an de februaro j. k. ni havis ĝeneralan kunvenon. Kamarado Nikolaj Parvanov raportis je temo: «La tutpopola movado por plenumo de la tria kvinjarplano en reduktitaj templimoj kaj la loko de la bulgaraj esperantistoj en tiu ĉi tutpopola movado.» Multaj samideanoj (Kaŝĉiev, Silvestriev, Marov, Evtimov k. a.) entuziasme aprobis la iniciaton kaj deziras partopreni en la plenumo de la grandega programo al la socialismo kaj komunismo.

La kunveno unuanime decidis — ĉiu esperantisto — kie ajn li laboras — estu ne nur aktiva funkciulo en la nuntempa tutpopola movado, sed li devas esti modelo kaj iniciatulo en la plenumo de la taskoj.

Ĉiuj esperantistoj ankaŭ promesis en sia privata korespondado vaste klarigi al siaj korespondantoj (ĉir-

kaŭ 100 personoj) la signifon de la tutpopola movado, la grandan entuziasmon de la laboristaro en la kluboj plenumi la taskojn de la tria kvinjarplano en reduktitaj templimoj por la bonstato kaj feliĉo de la bulgara popolo.

A. Bojaĝiev

Stanke Dimitrov. La 8-an de januaro 1959 j. ni havis kunvenon, en kiu ni decidis subteni la tutpopolan movadon por plenumo de la kvinjarplano en reduktitaj templimoj; ni ĉiuj fariĝos agitantoj de la novo, kiun oni konstruas en nia lando; ni postulos de la urba konsilantaro lokon, kie ni plantos arbojn kaj ĝin ni nomos «Esperanto». Ni komencos interŝanĝi sperton ĉi rilate kun aliaj Esperanto-societoj.

B. Mihajlov

Vraca. Ni havas kurson por geĉivitanoj kun 30 partoprenantoj, kiu bone funkcias. La gekursanoj ĝin vizitas regule. La kurson gvidas Radoslav Triĉkov. En la apuda vilaĝo Bistrec (Vraĉansko) funkcias kurso kun 15 gekursanoj, gvidata de Krum Ivanov.

R. Triĉkov

LA PROTOKOLOJ — GRAVAJ DOKUMENTOJ

Jam la antaŭhistoria homo strebis eternigi siajn revojn, siajn agojn, sian vivon... De liaj primitivaj pentraĵoj la historiistoj ekscias multon pri la iama vivo de la prahomo. La moderna homo disponas multe pli da rimedoj por eternigi siajn agojn, sed precipe grava por la celo estas la skribo.

Niaj Esperanto-societoj havas tre varian societan vivon. Ni havas organizajn kunvenojn, regulajn kaj eksterordinarajn jarkunvenojn, klerigajn kunvenojn kaj multajn aliajn formojn de societa vivo. En la organizaj kaj en ĉiuj aliaj kunvenoj diversaj samideanoj esprimas tre

valorajn pensojn, oni prenas gravajn decidojn. Ĉio ĉi meritas kaj ni devas ĝin enskribi en la protokolibrojn. Ja per la protokoloj la prezidanto kaj la sekretario kontrolas la ĝustatempan plenumon de la decidoj. La societoj havas tre varian praktikon de manipulado kun la protokoloj. Iuj skribas la protokolojn sur apartajn foliojn, aliaj skribas ilin en kajeroj aŭ en speciale binditaj protokolibroj.

Kiel ajn ili estu skribataj, ili devas esti zorgeme gardataj, en bona ordo. Ja la protokoloj havas du gravajn rolojn. La unua rolo estas organiza. Per ili oni dokumentas la societan

vivon, la decidojn, la proponojn de la samideanoj. Do ili estas gvidilo por la plenumantoj de la decidoj. Ĉar la bonaj decidoj estas nur komenco de fruktodona agado. Pli grava estas la plenumo. En nia praktiko multaj bonaj decidoj restas nur surpapere. Utilon de ili ni ne havas. La bone gvidataj protokolibroj helpas la regulan plenumadon de la estraraj kaj kunvenaj decidoj.

La dua grava rolo de la protokoloj estas la historia. El ili estonte ni povus ĉerpi interesajn informojn pri la historio de la societoj. Eble multaj el ni scias, ke dum la renesanco niaj praavoj, kiuj ne pretendis pri alta instruiteco, pritaksis bone la signifon de tiuj sciigoj, scipovis eternigi siajn farojn en specialaj libroj, bulgare nomataj «kondiki». El tiuj li-

broj la historiistoj ĉerpas valorajn informojn pri la vivo de la bulgaroj antaŭ 100 — 200 kaj eĉ pli da jaroj.

Konsiderante la gravan signifon de la protokoloj, la estraroj devas bone prizorgi ilin. Rekomendinde estas, ke ili estu subskribataj ne nur de la sekretario, sed de ĉiuj estraranoj. Tio garantias, ke ili enhavu ĉiujn necesajn elementojn. La kontrolaj komisionoj, kies rajtoj estas pligrandigitaj per la novaj ŝanĝoj en la statuto, devas regule observi la korektan skribadon kaj zorgeman gardadon de la protokoloj kaj helpi en tiu rilato al la estraroj. Ja la protokolo estas plej grava organiza dokumento.

Ivan Sarafov,
Violin Oljanov

BIBLIOGRAFIO

ANTOLOGIO DE ORIGINALA ESPERANTO-POEZIO.

La «Esperanta antologio», redaktita de la skota poeto W. Auld, elite kolektas en 648 paĝoj 350 poemojn de 90 poetoj el 35 landoj. La komplekto ampleksas sepdekjaran periodon: de la naskiĝo de Esperanto, 1887, ĝis 1957: ĝi estas dividita en tri partojn: 1) primitiva romantismo, 1887—1919; 2) polurita romantismo, 1919-1939; 3) metafiziko, ek de 1945.

La plej elstaraj poetoj de la unua periodo estas: L. L. Zamenhof, E. Privat, A. Grabovski; en la dua periodo: K. Kalocsay, J. Baghy, Mihalski, R. Schwartz; en la tria periodo W. Auld, Dinvvodie, Francis, Rossetti, M. Boulton, Mattos, Urban, Urbanova, Ragnarsson, P. Thorsen. La «Esperanta antologio» estas internacia sensacio en la kampo de lingvo kaj literaturo.

EN LA REDAKCIO ESTAS RICEVITAJ JENAJ GAZETOJ KAJ JURNALOJ

Germana Esperanto Revuo, Svisa revuo, Flandra esperantisto, Esperanto, Heroldo de Esperanto, Franca Esperantisto, The British Esperantist, Nederlanda Esperantisto, Indonezia Esperantisto, New Zeland Esperantist, Bulteno de Esperantista klubo — Praha, Bulteno de la Hungarlanda Esperanto Konsilantaro, Nuntempa Bulgario, Bulgara filmo, Junularo de Bulgario, k. a.

Ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj estas je dispono de la legantoj en la kanceldario de la asocio.

«Bulgara esperantisto» bezonas vian helpon. Abonigu amase viajn amikojn. Abonigu al B. E. ankaŭ urbajn, kvartalajn, fabrikanj bibliotekojn.

ANGEL PETKOV IVANOV — ANĜELO

Angel Petkov naskiĝis la 2-an de julio 1909 j. en Orjahovo en malriĉa progresema familio. Lia patro Petko Ivanov, konata socialdemokrato kaj sekretario de la socialdemokrata organizaĵo en Orjahovo, pereis dum la unua mondmilito. Sepjaraĝa, Angel Petkov jam estis novico en liberejo kaj komencis porti sur siaj ŝultroj la malĝojan sorton de orfo de l' milito.

Nature inteligenta, sciama kaj modesta, li absolvis gimnazion en Orjahovo. En 1930 j. li aktive partoprenis en la striko de la lernantoj en la gimnazio kontraŭ la faŝistaj aspiroj en la lernejoj. Kreskinte en mizero, de sia junaĝo Anĝelo ekstaris en la vicoj de la batalantoj por libero kaj progreso.

Jam en la VI-klaso de la gimnazio (nun X klaso) Anĝelo ellernis la internacian lingvon Esperanto kaj ligis sin kun progresemaĵoj esperantistoj en la lando — Nikola Aleksiev, Simeon Petrov k. a. Li fariĝis membro de la Laborista esperantista asocio. Favorito de la progresemaĵoj junuloj en Orjahovo, li eniris en la vicojn de la Laborista junulara asocio (RMS) kaj en 1930-1931 j. estis sekretario de la organizaĵo de RMS en la urbo.

Li deziris akiri superan klerecon kaj tiucele dum 1931 alveturis Sofion. Li fariĝis studento de pedagogio. Anĝelo tuj eklaboris kun la progresema studentaro kaj membriĝis al Bulgara ĝenerala popola studenta asocio (BONSS) kaj fariĝis membro de la Centra komitato de la Laborista esperantista asocio. Por vivteni sin li estiĝis pentristo de firmaoj.

En 1932 j. li trafis la malliberejon



kaj estis juĝata kiel redaktoro de ĵurnalo «Mejdunaroden ezik» (Internacia lingvo), organo de la Laborista esperantista asocio. Li estis forigita de la universitato. Post la liberiĝo dum junio la saman jaron li komencis labori en la Sendependaj laboristaj profesiaj unuiĝoj kiel administranto de ĵurnalo «Edinstvo» (Unueco) kaj baldaŭ estiĝis ĝia respondeca redaktoro.

En 1934 j. Anĝelo estis denove juĝata, pro kio li komencis nelegalan vivon. Li laboris por la organizado kaj disvastigado de la nelegalaj eldonaĵoj: cirkuleroj, alvokiloj k. a. Li estis valora helpanto de Stanke Dimitrov, Emil Markov kaj aliaj gvidantoj de la komunista partio.

Post kelkaj jaroj li denove estiĝis studento kaj aktiva membro de BONSS. Li redaktis la ĉiusemajnan esperantan paĝon de la ĉiutaga ĵurnalo «Zarja». Li estis ankaŭ kunla-

boranto de la satira ĵurnalo «Horovod». En 1941 j. li estis komisiita kiel kunlaboranto de la Centra komitato de la Bulgara komunista partio. Sub la gvidado de Vlado Georgiev li kune kun s-ano Asen Grigorov kaj Sabi Enčev tajpis stencilite la cirkulerojn de la partio kaj forsendis ilin en la landon.

La 5-an de marto 1941 j. la tuta grupo estis arestita kaj ĵetita en la malliberejon. Anĝelo, kies sano estis delikata kaj nestabila pro la mizero, ne eltenis la kruelan inkvizicion de la torturistoj. Anĝelo, la sindona kaj kuraĝa batalanto por libero kaj progreso, finis sian vivon la 13-an de junio 1941 j. kiel politika arestito en la sofia malliberejo.

Anĝelo tre aktive laboris por la organizo de amasa internacia koresponda movado, por senpera kontakto de la popoltavoloj diverslandaj, por fortikigo de la paco kaj la demokratio. Li gvidis plurajn Esperanto-kursojn, redaktis ankaŭ aliajn eldonaĵojn de la Laborista Esperanto-asocio, inter kiuj «Informilo», estis respondeculo de diversaj nelegalaj presaĵoj.

Ni konservas la memoron pri la kuraĝa, sindona samideano — viktimo de la kruela faŝismo, kaj ni penas labori kiel li por pli grandaj sukcesoj de nia movado.

Trajana Petkova
Asen Grigorov

8 DE MARTO — INTERNACIA VIRINA TAGO

Ĉiu virina koro renkontas kun entuziasmo kaj emocio la internacian virinan tagon, kiu estas tago de la bataloj kaj venkoj por la virinoj en la tuta mondo.

En la unuaj jaroj de la 20-a jarcento la virinoj komencis ardan batalon por egalrajtoj kun la viroj en la ekonomia kaj politika vivo. En la programoj de la socialdemokrataj partioj oni skribis, ke nur la venko de la laborista klaso super la kapitalismo liberigos la virinojn. La konferenco de la socialdemokrataj virinoj en Kopenhago en 1910 decidis, ke oni ĉiujare festu la 8-an de marto kiel virinan internacian tagon. De post tiu konferenco ĝis nun la virinoj heroe batalis por politikaj kaj ekonomiaj rajtoj.

La venko de la Granda oktobra revolucio liberigis la virinojn en 1/6 de la terglobo.

La sovetaj virinoj komencis festi la 8-an de marto kiel tagon de batalo, per kiu oni fortikigos la sovetan

aŭtoritaton, kiel tagon, en kiu la virinoj manifestas sian partoprenon en la socialisma konstruado.

Nun milionoj da sovetaj virinoj entuziasme partoprenas en la grandaj pacaj konstruaĵoj de la komunismo.

La dudekunua kongreso de la komunista partio de Sovetunio donis al la sovetaj popoloj grandajn taskojn — ĝis 1965 j. ili devas superi la produktaĵon je persono de Usono.

La sovetaj popoloj deziras plenumi la grandan taskon en la batalo por paca kunekzistado kaj konkurado inter la socialisma kaj kapitalisma sistemoj, por la venko de la komunismo.

La virinoj el la popoldemokrataj landoj — Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio, Albanio kaj en nia lando sekvas la klaran vojon de siaj sovetaj fratinoj. Ili partoprenas en la tuta ekonomia kaj politika vivo en siaj landoj. Ili konscias, ke partoprenante en la socialisma kons-

truado, la virinoj plej bone defendas la pacon kaj la feliĉon de siaj infanoj.

La virinoj en la ĉina popola respubliko, dank' al la venko de la popolo, gvidata de la komunista partio, estas liberaj kaj havas egalajn rajtojn kun la viroj.

En la granda ekonomia salto, kiun faras Ĉinio, la ĉinaj virinoj aktive partoprenas por la prospero de la industrio, kaj la granda konscio de la ĉinaj virinoj estas bona ekzemplo por la laborulaj virinoj en la tuta mondo.

En nia lando la problemoj pri la libereco kaj la egalrajtoj de la virinoj estis solvitaj post la 9-a de septembro 1944 j., kiam nia lando kaj nia popolo estis liberigitaj de la monarkofaŝismo.

En la peza industrio laboras 17406 virinoj, el kiuj 2852 estas inĝenieroj kaj teknikistoj. En la teksta industrio laboras 41,903 virinoj.

Kvindekdu procentoj de la laboruloj en la vilaĝaj kooperativaj mastrumoj estas virinoj.

Multaj virinoj, kiuj laboras en la industriaj entreprenoj kaj en la kooperativoj, estas distingitaj per ordenoj kaj medaloj, multaj el ili estas heroinoj de la socialisma laboro.

En la tezoj de la Centra komitato de la komunista partio estas antaŭvidite, ke la amplekso de la industrio en 1965 jaro devas esti 3—4-oble pli granda ol en 1957, la tuta amplekso de la kooperativaj mastrumoj devas esti 4-oble pli alta ol en 1957, kaj la enspezoj en 1962 devas esti duoble pli grandaj ol en 1957, kaj en 1965 — trioble pli grandaj.

Ni devas plenumi la taskojn en reduktitaj templimoj — anstataŭ en kvin jaroj, ni devas atingi la samajn rezultojn en 3-4 jaroj.

Dum 3-4 jaroj en la lando devas esti konstruitaj pli multe da fa-

brikoj, uzinoj, elektrostacioj, kultur- kaj ripozdomoj, infandomoj, infanĝardenoj, novaj komfortaj sunplenaĵdomoj, ktp.

Tio permesos al la virinoj pli vaste partopreni en la produktado kaj en la socia vivo de nia lando. La labortago daŭros 7 aŭ 6 horojn. La plej malgranda salajro estos 600 levoj.

Tiu estonteco ne estas malproksima. En la fabriko «E. Thälmann» la laboristinoj jam laboras 5 tagojn semajne kaj ripozas 2, ankaŭ en la fervojuzino oni komencis labori nur 5 tagojn, produktante en 5 tagoj la saman produktaĵon kiel en 6, kaj ricevante la saman salajron.

La Bulgara komunista partio alte taksas la laboron de la bulgaraj virinoj. Tio devigas nin, la bulgaraj virinoj, labori des pli aktive, des pli bone, des pli entuziasme ol antaŭe, por la plenumo de la kvinjara plano en reduktitaj templimoj.

Ĉiu tago alportas al ni novan ĝojon, novajn sukcesojn, novajn perspektivojn.

Nia popolodemokrata aŭtoritato donas la grandajn eblecojn al la patrinoj, ke ili estu ĝojaj, ke niaj infanoj estu feliĉaj.

La virinoj el la tuta mondo batalas por paco. Ili ne deziras, ke la atombomboj mortigu iliajn infanojn, detruu iliajn domojn.

La virinoj ne deziras, ke iliaj edzoj, iliaj filoj partoprenu la agresivan militon kontraŭ la popoloj, kiuj deziras vivi kiel liberaj popoloj, vivi en paco.

Saluton, koran saluton al ĉiuj virinoj, batalantaj por paco!

Koran 8-martan saluton al ĉiuj esperantistinoj, batalantaj por paco, por Esperanto, tiu belega ilo de popola interkompreniĝo!

Vivu la internacia virina tago!

Tr. Petkova

PETRO POLIŜĈUK



En urbo Taŝkent, Uzbekistana SSR, vivas la malnova esperantisto inĝ. Petro Poliŝĉuk. Li estas invalido de la lasta mondmilito kaj nun disvolvas viglan por- kaj peresperantan agadon. Apartan ŝaton li manifestas al la buglara popolo kaj al la bulgara Esperanto-movado. Ĉi-lastan li treege helpas. Petro Poliŝĉuk estas unu el la elstaraj tradukistoj de versaĵoj el la rusa lingvo en Esperanton. Unuj el liaj plej bonaj tradukoj estas la versaĵoj de la granda ukraina poeto kaj revoluciulo Taras Ŝevĉenko. Sed s-ano Poliŝĉuk estas konata ankaŭ kiel originala Esperanto-poeto. Ĉi-sube ni publikigas du liajn versaĵojn, en kiuj li esprimas sian amon al nia lando kaj al nia Esperanto-movado.

AL LA TRIDEKTRIA KONGRESO EN VARNA

El diversaj partoj de la lando
kolektiĝis multaj batalantoj
por la Paco, pro la Amo granda
al la kara lingvo Esperanto.

El diversaj partoj de la mondo,
komprenante unu la alian,
homoj el la Esperanto-rondo
venis al belega urbo via.

Varna! Urbo de la tridektria!
Mi salutas vin kaj ĉirkaŭprenas!
Sed al tiuj, vere, mi envias,
kiuj la Kongreson partoprenis.

Mi imagas la solenkunsidon:
paroladojn de l'samideanoj,
renkontiĝojn kaj feliĉan ridon,
te-vesperojn kaj «Je via sano!»

Aŭdu, vi amikoj miaj «dragi»!*

Aŭdu ĉiuj mian kordeklaron!
Kredas mi, ke venos ja la tago:
mi vizitos vian tridekkvaran...

* «dragi» en bulgara lingvo — «karaj».

SALUTON

Ho, lando de rozoj! Per versoj, per
prozo

poetoj, verkistoj vin gloras.
Soveta anaro, samkiel bulgaroj,
pri viaj herooj memoras.

Memoras pri Ŝipka, pri l'sango
verŝita
dum niaj komunaj bataloj,
pri altaj montaroj, pri densaj
arbaroj,
pri vastaj riveroj kaj valoj.

Al vi, miaj karaj gefratoj bulgaraj,
mi sendas salutojn elkorajn.
Batalu por Paco, sen timo, sen laco,
kaj estu vi ĉiam fervoraj!

Ne estas vi sola, kuraĝa popolo!
Amikoj vin ja akompanas:
la tuta pacmondo, kun vi en
fratrondo,
batalas nun mano en mano.

Kaj el malproksime, mi sendas
esprimojn
de mia estim' emocia
al vi, land' ŝatata, al vi, ho gefratoj,
al vi, komunista partio!

LEVSKI PAROLAS

«Nek estron, nek potencon konas mi,
nek baron antaŭ la kuraĝa volo!
Se perdos mi — ja perdos nura mi,
se gajnos mi — do gajnos la popolo.

Ĉu ni bezonas vivon sub la jug' ?
Ĉu ni bezonas junon sub katenoj?
Pli bone ni formortu en la lukt' ,
sed esperante: La libero venos!

Kaj post alveno ĉe ni de l'liber'
la vastan mondon mia kor' trapasos,
kaj kie regas estro kaj sufer',
mi ribeligos la popolamasojn.

Sub la brilanta sun' al ĉiu herb'
al ĉiuj ŝton' kaj birdo en kamparoj
donita estas ero da liber',
sed ĝin ne havas nur, nur la
bulgaroj.

Mihail P. Stojanov

Kiu rajtigis la tiranon nun
subpremi miajn fratojn kaj fratinojn?
Ĉu ĉiujn nin ne hejtas sama sun',
kaj naskas, nutras nin la
ter-patrino?»

Tiel parolis Levski sub kandel'
al la montanoj duraj kaj modestaj;
kaj por liber' ekbrulas la ribel'
pro vortoj fajraj kaj protestaj.

— Se perdos mi — ja perdos nura mi,
se gajnos mi — do gajnos la popolo.
Kunuloj, brilas vojo antaŭ ni:
batal', batal' ĝis venk' aŭ mort'
memvola.

Ni juru super la brilanta glav'
je nia ruĝa sango ĉe la brusto,
ke ĉiuj pretas morti en batal'
por la libero, por la justo!»
Stefan Kiraĝiev

FELIĈO

Rakonto

Tiun matenon mia panjo mortis. Mi
ne memoras mian patron. Li estis de-
longe murdita, kiam mi estis tute
malgranda infano.

Mia panjo ofte diris al mi:

— Vi ne devas estiĝi, fileto mia,
kiel via patro!

Mi ne komprenis kial ŝi diris tiel.
Ĉu ŝi ne amis lin, aŭ li estis mal-
bona? ...

Nun estas printempo. La maljuna
prunarbo estas disflorinta. Abeloj zu-
mas ĉirkaŭ ĝi, surflugas sur ĝiajn
blankajn floretojn kaj forflugas mal-
proksimen. Sur la stratoj estas koto,
sed baldaŭ ĝi sekiĝos. Estas varme.
Rigardante la blankiĝintan prunar-
bon kaj aŭdante la zumadon de la
abeletoj, mi pensas pri mia patro.

Li estis ŝipestro de malproksima
naĝado. Li oficis en la Danuba ŝipa-
ro. Ĉiam, kiam tiu ĉi prunarbo vestu-
mis sian blankan tualeton kaj sur la
kotplenaj stratoj la homoj surtretis
la vojetojn, li forlasis la hejmon. Da-
nubo liberigis sian glaciigintan kor-
pon kaj la ŝiparo eknaĝis sur ĝi. Ek-
ridis ankaŭ mia patro.

De li restis la granda portreto
kaj mi ĝin rigardas ĉiutage. Liaj
okuloj estas severaj, nigraj kiel la
miaj. Fotografita li estas kun ĉiutaga
vesto. Sur siaj manikoj li havas fili-
granajn galonojn kun rombetoj
rande.

La plej valora, kio restis de mia
patro, estas du grandaj albumoj. Bo-
ne estus, esti ŝipestro! Jen, paĉjo

staras sur sia placeto kun binoklo, pendigita sur la kolo. Apud li plenaĝa maristo turnas la direktilon. El aliaj fotografiaĵoj min rigardas grandkorpaj, fortegaj maristoj. Mia patro estis ankaŭ kiel ili. Panjo diris, ke li estis sperta dommastro...

Entute vesperiĝas. La maljuna prunarbo dronas en mallumon. Sur la stratoj oni aŭdas malproksiman frapadon de veturiloj, kaj subite iu malrapide supreniras la ŝtuparon. Tio estas paĉjo. Kial mi pensas tiel — mi ja neniam renkontis mian patron kaj neniam plu mi vidos mian panjon en la ĉambro.

Mi angoras, sed mi ne devas mal-kuraĝiĝi. La estinteno ne revenos. Mi havas diplomon kun plensukceso. Mi studos. Mi iĝos marŝipestro.

La suno brilas mole, varme kaj estas tiel agrable, tiel agrable!... Miloĵ da abeloj kvazaŭ ĥore zumas en la aero kaj ĝoje svarmas. Kien mi devas iri?

Mi ekserĉos Dimka-n. Ŝi ankaŭ estas distingitino. Ŝi ne estas belega, sed ŝiaj okuloj estas tre belaj, tiaj grandaj kaj malhelaj. Ŝia patro estas maristo. Li ofte min invitas gaste al ili, sed mi ĝenas min gasti. La ununura fraŭlino, kiun mi estimas, estas Dimka. Mi ne povas diri, ke mi ŝin amas, sed io ĉiam min pensigas, ke ŝi estiĝos mia edzino.

Jam pasis tuta jaro, de kiam mi vagas kiel senhejmulo, mi ne emas eniri hejmen. Ĉio estas dezertiĝinta. La vestoj dronas en polvo, ĉirkaŭe odoras je ŝimo. La maljuna prunarbo kliniĝas kvazaŭ orfo. La korto estas malpura, el ĉiu anguleto kvazaŭ elŝprucas frosto kaj angoro.

Mi forlasis la studadon. Dimka volis studi en la universitato, sed ankaŭ rezignis. Delonge mi ne vidis ŝin. Iun vesperon mi renkontis ŝin surstrate.

— Kien iras vi? — demandis ŝi kaj

mallevis la okulojn. Sur malbona vojo vi ekiris. Mia paĉjo volas vidi vin. Li diros al vi ion gravan.

Ni devojiĝis kaj sidiĝis sur unu benkon en la proksima ĝardeneto. Ĉirkaŭe ludis infanoj, ridis knabinoj. Kion volas Dimka de mi?

— Vi pereos. Pensu pri via feliĉo siatempe, ĝis kiam estas frue.

— Ĉu mi estas malfeliĉa? Kaj kion signifas la vorto «feliĉo»?

Dimka ofendiĝis, ekploris kaj antaŭ ol foriri, diris: — Feliĉo? Venos tempo kaj vi mem pripensos tion. Kaj mi... mi simple amas vin kaj ne povas vin rigardi tiel ĉifona.

— Eh, mi ne estas tiel ĉifona, sed mi ne havis monon. Iam mi estis malriĉiĝinta, sed baldaŭ mi trovis la solvon: mi vendis «Filipson». Dum la printempo mi vendis la grandan vestŝrankon. Mi liberiĝis ankaŭ de la bufedoj. Ja ili ne estas necesaj al mi. Hejme restis preskaŭ nenio. Mi longe pensis kion ankoraŭ mi povas vendi, por travivi la vintron.

Proksimiĝis la aŭtuno, malrapida, mallaborema, malvarma. La homoj komencis marŝi pli rapide sur la stratoj, frotante manojn, kaj kuris al siaj hejmoj. Ĉiam pli ofte tondradis aŭtomobiloj, ŝarĝitaj per ŝtonkarboj, frapadis la veturiloj kun hejt-ligno. La urbo preparis sin por la vintro. Vespere la kinejoj pleniĝadis per spektantoj kaj malfrue nokte sur la senhomaj trotuaroj fajfis nur la malvarma vento.

Mi marŝis kun manoj en la poŝoj kaj iu voĉo de tempo al tempo vokadis en miaj oreloj:

— Feliĉo? Kion signifas la vorto «feliĉo»? Kaj alia voĉo, pli potenca kaj pli kruda al ĝi respondadis:

— Venos tempo kaj vi mem pripensos tion.

Mi angoras. Mi enhejmiĝis kaj ĵetis min sur la liton. Mi rememoris pri Dimka, sed mi ne aŭdacas pensi pri

ŝi. Mi turnis la kapon. Ĝuste kontraŭ mi pendis la portreto de mia patro. Liaj severaj okuloj rigardis min, kvazaŭ ili min demandis:

— Kion vi faras, mia filo? Ĉu tiel rapide elĉerpiĝis viaj fortoj? Ne kapitulacu, vi estas juna, estas ankoraŭ frue!

Mia koro ekdoloris. De post kiam mi komencis drinki, ĉio en mi doloras. Mi rigardas min en la spegulo — mia vizaĝo estas paliĝinta, kvazaŭ ne estas mi. Kion mi devas fari? En la poŝo mi ne havas eĉ unu levon. Baldaŭ mi vendis la lastan aĵon, kion mi havis: mian horloĝon...

— Paĉjo, paĉjo, eĉ rompitan mone-ron mi ne kostas!

Relegante tiujn paĝojn, mia animo malĝojas kaj angoras. Mi angoras pri la estinteco. Pri mia pekoplana estinteco.

Pense mi turnas min al miaj junulaj jaroj kaj vidas kiom mi estis malforta tiam. Mi estis timigita de la vivo, mi malkuraĝiĝis. Mi fariĝis nuda kiel almozpetula bastono, kiam subite oni alvokis min por soldat-servo. Mi servis kiel marista soldato tri jarojn. Kiam mi forlasis la kazer-non, la vivo kontraŭstariĝis denove antaŭ mi. Kien? Kun malplenaj ma-noj en la poŝoj oni ne povas vivi...

Dimka helpis al mi. Ŝia patro multe insistis min vidi. Mi ekkuraĝis kaj aliris.

— Vi tutsimilas vian patron — di-ris li anstataŭ saluto.

Mi estis ravita de tiu ĉi maljuna maristo. Lia granda kaj fortika kor-po, liaj duonblankiĝintaj haroj, lia mola voĉo kaj liaj varmaj patraj okuloj min subigis. Mi ekrigardis Dimka-n. Ŝi brilegis pro ĝojo.

— Jes, vi tute similas vian patron, parolis ŝia patro. — Kaj nun? Ĉu vi venos kun mi sur la ŝipon? Ja vi es-tas jam maristo.

Mi ne memoras kion mi parolis, sed ĉiam, kiam mi lin vidas, mi re-memoras tiun renkontiĝon, kiu des-tinis mian estontecon.

Mi devas konfesi, ke tiam mi volis forlasi mian patrolandon. Neniam mi deflankiĝis de ĝi. Ŝajnis al mi, ke en la vagado mi trovos mian viv-vojon.

Kaj mi ekiris sur la vojoj, sur kiuj naĝis mia patro. Sed unu subpremi-ta sento senĉese premis mian gor-ĝon. Mi sentis min kiel malsan-ulon. Aliel ne povas esti. Mia patro estis ŝipestro, kaj mi — maristo. Mi trankviliĝadis nur kiam mi vidis la patron de Dimka. Li estis politika komisaro en nia ŝipo.

Mi sentis, ke io turmentas mian animon, gratas la konsciencon.

Unu fruan matenon ni alveturis Vienon. Ĝis tagmeze mi ĉirkaŭiris la urbon kaj irante al Pratero mi haltis por trarigardi la monumenton de Mozart. Sed mi ankoraŭ ne al-proksimiĝis al ĝi, kiam ĉirkaŭ mi aŭ-diĝis mirindaj sonoj de malprok-sima muziko, kiu kvazaŭ elŝprucis el la tero. Unu post alia sekvis la sorĉaj melodioj kaj meze de ili unu konata voĉo denove vokis:

— Feliĉo?

Kaj ekŝajnis al mi, ke pli longan ol tiun ĉi tagon mi neniam travivis.

Denove la tagoj viciĝis longaj, grizaj kaj monotonaj. Sed ne pasis multe da tempo kaj oni sciigis al mi forveturi por studi en kursoj. Mi miris kial oni ĝuste min sendas al kursoj? Mi havas malbonan estintecon, mi es-tis malbona filo, drinkulo, mi havis malbonajn kamaradojn. Ja, ĉu ne ek-zistas pli inda maristo ol mi? Aŭ oni volis tiamaniere helpi al mi?

Mi finis la kursojn. Mi revenis sur la saman ŝipon. La ŝipanaro ak-ceptis min varme. Plej multe ĝojis la patro de Dimka: mi estis jam ŝipestro.

Kaj jen mi ĉion komprenis.

Ĝi okazis tiel. Ni porksimiĝadis la bulgaran landlimon — tiun ĉi fojon ni alvenis de sude. La ŝipo bruadis per siaj potencaj motoroj kaj pene traboradis sian vojon kontraŭ la akvofluo. Estis frua printempo, sed la suno varmis kiel dum la somero.

Jus mi estis liberigita de deĵoro kaj preparis min por kuŝiĝi, kiam la ŝipestro subite min alvokis. Mi ekiris al li. Tie estis jam kolektiĝinta la tuta ŝipanaro kiel je ceremonio. Nur la deĵora maristo staris apud la flago preta ĝin mallevi ĉiumomente. Mi nenion komprenis. Kio okazis? La ŝipestro malfermis grandan keston kun emajla kovrilo kaj donante ĝin al mi, emociite diris:

— Tio ĉi estas por vi. Malnova tradicio ĉe la maristoj estas plenumi la testamentojn de siaj fratoj. Via patro estis nia kara frato. Li estis ŝipestro de tiu ĉi ŝipo. Li servis honeste al sia popolo. Vidu kio estas skribita sur la kesto: «Oni devas malfermi tiun keston, kiam mia filo estiĝos kiel mi.» — Ni — li turnis sin al la politika komisaro — plenumis unu lian deziron: ni faris vin ŝipestro.

Miaj okuloj larmiĝis. Mi ne eltenis kaj mi enigis la manon en la keston. Tie estis nur unu taglibro ruĝe bindita. Pro angoro mi apenaŭ tralegis sur la unua paĝo: «Mi kredas, ke mia filo kaj miaj kamaradoj daŭrigos la batalojn. Ŝipestro N. M. Ivanov.»

Mi ne havis paciencon por vidi, kio estas skribita en la taglibro kaj ekkuris al mia kajuto. Sed la deĵoranta maristo apud la flago min najligis sur la saman lokon. La flago malrapide malleviĝadis ĝis la mezo de la masto. Ĝi faladis en honoro de mia patro...

Post tio la politika komisaro rakontis al mi, ke antaŭ multaj jaroj la sama ŝipo ekveturis laŭ sia ordinara vojo al Sulina. Ĵus ĝi estis trapasinta la landlimon, kiam de la direktilo en plena forto ĝin alpostkuris rapidnaviga motorŝipeto. El ĝi eliris civila viro, policano. Li volis aresti unu el la maristoj. Mia patro estis saĝa homo kaj spritante tuj diris al la policano:

— Ni troviĝas en fremdaj akvoj. Tie ĉi la aŭtoritato apartenas al mi. Kaj li ne permesis la areston. Tiam la policano pafis sur lin kaj dum la maristoj rekonsciiĝis, li estis jam mortinta. Tial nun, kiam la ŝipo preterpasas tiun lokon, oni respekte mallevas la flagon kaj fordonas estimon al mia patro.

La maristo, kiun volis aresti la policano, estis nia politika komisaro, la patro de Dimka. Li kurbigis la manojn de la murdisto kaj lin ĵetis en Danubon kiel hundon. Poste li forlasis la marnavigadon kaj estiĝis malleĝulo.

— Li estis la animo de nia ŝipo. Kvazaŭ li antaŭsentis sian morton kaj li volis vidi en vi sian anstataŭulon — finis sian rakonton la patro de Dimka kaj leviĝis.

Traboris min spasmoj. Mi estis kiel senkonsciigita. Mi eniris mian kajuton, fermis la okulojn kaj ekploris kiel infano.

Per nenio mi povas rekompenci al mia patro kaj al liaj kamaradoj. Mi ĵuris plenumi ankaŭ la alian deziron de mia patro — mi iĝos komunisto!

Mi foliumas la paĝojn unu post alia kaj ili transportas min malproksimen, malproksimen...

Ekstere estas printempo. La stratoj ankoraŭ estas kotplenaj, sed baldaŭ ili sekiĝos. Vesperigas. La maljuna prunarbo denove estas disflorinta kaj sin preparas renkonti la

vesperon. Nevole mi pensas pri la feliĉo kaj ŝajne ĝi estas io granda, tre granda. Mi ne povas ĝin difini. Sed kiam mi pensas pri mia patro, rigardas lian portreton kaj rememoras lian testamenton, mi pleniĝas per fiereco kaj mi iĝas feliĉa. Verŝajne la feliĉo estas antaŭ ĉio memfido, libereco kaj preteco sin oferi por la aliaj.

Lingva konsilejo

«KAJ», «ANKAŬ», «SAME»

Jen estas tri ordinaraj, eĉ tre ofte uzataj vortetoj. Okazas, tamen, kvankam ne ofte, misuzo — «kaj», anstataŭ «ankaŭ», aŭ «same» — kion oni povus eviti. La kaŭzo de l' misuzo devenas de l' kutimo en la nacia (bulgara) paroluzo. Kaj kvankam la nacia uzo ĉi foje certe ne estas mallogika, ĝia esperantigo estas malkonvena eĉ netolerebla. Ekzemple oni diras:

— Mi vizitos la specimenan foiron en Plovdiv.

— Kaj mi vizitos ĝin — anstataŭ:

— Ankaŭ mi vizitos ĝin.

«Kaj» en la komenco mem de l'frazo ne estas konvena. Alia ekzemplo:

— Mi ŝatas la naciajn lingvojn, tamen mi pli ŝatas Esperanto.

— Kaj mi (...) — anstataŭ:

— Same mi (.....).

Eble la neĝusta uzo de «kaj» en ĉi specia uzo en Esperanto estas ŝuldata al tio, ke «kaj» — ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la naciaj lingvoj — pro sia naturo, kunligas egalajn samspecajn elementojn en la frazo. Ekzemple:

La patro kaj la filo (substantivoj) estas ambaŭ inĝenieroj.

Mi sidas kaj la tiktakado de la horloĝo forgesigas min kvazaŭ per ĉiu frapo min malproksimigas de la estinteco. Mi atendas Dimka-n. La najbaroj diris al mi, ke ŝi foriris al la infana ĝardeno por preni nian infanon.

Sur la ŝtuparetoj aŭdiĝas paŝoj. Tio estas ŝi...

Tradukis: **Stojan P. Stojanov**

Alia ekzemplo:

Doni kaj preni (infinitivoj) ne estas la sama.

Tria ekzemplo:

Mi volas iri ĉe lin kaj mi invitos lin partopreni la laboron. La frazo estas malbone konstruita, ĉar estas kunigitaj «volas iri» kaj «invitos», estantaj diversspecaj gramatikaj elementoj.

Se el tiu vidpunkto oni povas — kaj mi opinias, ke oni povas — priaksi la ekzemplon «Kaj mi vizitos ĝin», oni ŝajne devas akcepti, ke ĝi estas tamen ĝustloka. (— mi vizitos — kaj mi... — pronomojn-.

Tamen ĉi tie temas pri tio, ke «kaj» nur kunligas kaj «ankaŭ» atestas pri ŝajna antaŭaĵo de l'unualoka elemento, rilate al kiu la dualoka siaflanke ŝajnas iasence duagrada. T. e., tiu, kiu unue deklaris, ke li vizitis la foiron de Plovdiv, estas unua el la duopo kaj la dua kvazaŭ aliĝas al li. Kaj, por ke la aliĝo egaligu iamaniere la du elementojn — ja logike ili estas egalaj — estas necesa en Esperanto pli emfaza ol «kaj» aligilo, kia estas «ankaŭ».

Ilia Petrov

En la sekvonta n-ro ni publikigos tabelon de la planita plikresko de la societaj membroj kaj la plenumo en la unua trimonato. La societoj tuj devas elŝuldiĝi la membrokotizon al la asocia kaso.

LETERO EL VIETNAMIO

Eble vi scias, ke nia lando estas dividata je du regionoj: nórda kaj suda. En la norda regiono, sub la demokrata reĝimo, nia popolo ĝojege konstruas sian novan vivon kaj antaŭenmarŝas al la socialisma vojo, gvidata de la Vietnamia laborula partio kaj la leĝa vietnama demokrata respublika registaro. La suda regiono, male, sub la subpremado de la registaro de Ngo Dinh-Diem, servistaro de USONO, establigas la amasmalliberigon de niaj lokaj bonaj patriotoj, kiuj nur postuladas la konferencon kun Nordregiono por la unuigo de nia patrio (laŭ la konvencio de Ĝenevo 1954).

Sed kia furiozaĵo! Kia suferajo! Kia abomenindaĵo! La 1-an de decembro 1958 j. la sangavida kliko de Ngo Dinh-Diem, havis deziraĉon venenmortigi la ses mil malliberigitajn en la malliberejo, nomata Fuloi, proksime je 30 km de urbo Saigon, venenigante ilian tagmanĝon, mortpafis ilin kaj bruligis la malliberejon. Pli ol mil personoj mortis, la plimulto estas torturata de la veneno. Oni ankoraŭ ne scias ĉu ili restos vivaj aŭ mortas.

En nia ĉefurbo Hanoi kaj en la tuta norda regiono la popolo protestas kontraŭ la kliko de Ngo Dinh-Diem kaj kontraŭ la imperialistoj usonaj, en grandiozaj mitingoj ĉiuj niaj civitanoj laŭte kriadas: «For Usonon kaj klikon de Diem!» kaj postulas, ke oni tuj liberigu la malliberigitajn, ke la internacia komitato en Vietnamio enketu tuj tiun ĉi amasmortigan hitlerisman agon, malebligu, pluajn sangavidajn kruelaĵojn, savu la multmilojn da patriotoj malliberigitajn en Suda Vietnamio. Nia luktado kontraŭ Usono kaj la kliko de Diem daŭros ĝis plena venko.

Ni petas vin, ni vokas vin, subtenadu nin, nian popolon en la

GRAVA POR LA INSTRUISTOJ KAJ LEKTOROJ, KIUJ GVIDAS KURSOJN EN LERNEJOJ

La instruista sekcio ĉe BEA en sia lasta kunveno — la 8-an de januaro 1959 j. decidis prepari statistikon pri nia penetro en la lernejojn.

Gekolegoj, tuj skribu leteron al la asocio, menciante koncize pri la adreso de la lernejo, en kiu klaso oni instruas la lingvon, kiom da gelernantoj partoprenas en la kurso, ĝis kiu leciono vi atingis, kiom da horoj semajne oni instruas, la nomo kaj la adreso de la kursgvidanto. Sur la kovetro notu klare — POR LA INSTRUISTA SEKCIO.

I S ĉe BEA

Dum 1959 j. «La Esperantista laboristo» ne aperos. La samideanoj, kiuj sendis abonsumon de 8 lv., devas informi la asocion — se ili volas ricevi alian revuon, ili sendu la diferencon.



Laŭ ordono de Bulgara nacia banko ĉiujn ricevitaĵojn poŝtmandatojn la poŝto pagos al ni nur per nia konto ĉe la ŝparkaso.

Do, ni ne sendos plu kvitancojn al la transferintoj de sumoj. Ni nur sendos konfirman leteron pri la ricevo de la sumo, kaj kiel elspeza dokumento devas servi la kvitanco de la poŝto.

Ĉiujn p. m. sendu al BEA, poŝtkesto 66, Sofia.

Honore al la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio aperis nova glumarko.

granda luktado por savo de niaj patriotoj!

A. Nau,

kuracisto en malsanulejo Bak Mai,
Hanoi, Vietnamio,

